


horizontale:
1.supra korpopart’ 4. pingloarb’ 6. malgranda 9. romia di’ de l’ amo 10. mieloproduktant’ 11. river’ en Afriko 12. agad’ de infanoj 14. malgranda parto 15. plenum’ de ies volo (radiko) 17. malgranda best’ 20 muzika interval’ 22. dangera 23. kalcio-sulfato 24. negative ŝarĝita partiklo 26. tre granda (radiko) 27. vort’ por signi ion aŭ iun 30. membro 32. valormetalo 34 marŝi 36. alta domo 37.fluidaĵ’ por narkoto 38. part’ de dramo 39 alta ludkarto 40. produkto de kokino

vertikale:
1. poem’ kun melodio 2. tre ŝati 3. eŭropano 5. ar’ de konfuzaj sonoj 6. glata, senmonta (radiko) 7. nia planed’ 8. kunmiksaĵ’ de metaloj 12. printempa floro 13. iam surĉevala soldato 16. vitra vaz’ 18. grandpatrino 19. alkohola trinkaĵ’ 21. part’ de skeleto 25. sufiĉe manĝinta 26. ĉefa arteri’ 28. tradicia fabela rakonto 29. frukto 31. malantaŭa part’ de l’ kolo. 33. matena gut’ sur vegetaĵoj 35. forta dezir’

Solvo el januara SF.:

| urbo | Fortaleza | Tel Aviv | Berlin | Adelaide | Tampere |
|---|---|---|---|---|---|
| jaro | 2002 | 2000 | 1999 | 1997 | 1995 |
| dato | 3.-10.8. | 27.7.-1.8 | 31.7.-7.8. | 19.-26.7. | 22.-29.7. |
| landoj | 56 | 57 | 62 | 54 | 55 |
| vizitantoj | 1312 | 1212 | 2712 | 1224 | 2443 |
| temo | diverseco | lingvo... | tutmond. | toleremo | popoloj |





# Stralsundaj frekvencoj

Per Esperanto por popolkompreniĝo

jaro 2003 marto

## En Marto

En Mart’ kamparano
kun sia ĉeval’
preparas la kampon;
ne restas ĉe l’ stal’.
Li plugas kaj erpas,
agadas sur ter’
de l’ frua mateno
ĝis fin’ de l’vesper’.

*laŭ Josef Pommer*
*al malnova nordmoravia kanto*

Jen nia unua printempa eldono de S.F. Post la longa vintro ni nun esperas je sukcesplena kaj fruktodona jaro por Esperantujo. Jam estas konataj la unuaj aranĝoj kiel PSI dum pasko en Bonn, pomerania renkontiĝo 17.5. en Szczecin, Germana Esperanto-Kongreso dum pentekosto en Kaufbeuren, ĈEP 17. – 25.6. en Mielno, Universala Kongreso 26.7. ĝis 2.8. en Göteborg, SEFT 2. – 10.8., „95 jarojn Esperanto en Rostock“ 5. – 7. 9., semajnfina seminario 24. – 28. 10. en Neubrandenburg, landa Zamenhoffesto 29.11. en Neubrandenburg, nur por nomi kelkajn. La tutan kalendaron vi trovos ĉe www.esperanto.de.

***Malgranda informo pri la germana lingvo:***

Kiel aspektas germana teksto en Esperanto-skribmaniero?
Vidu mem!

Iĥ bin ajn pār jāre elter als īr, und ir verdet ajn par jāre lenger lēben als iĥ. Das hat niĥt fil aŭf siĥ. Aber glaŭbt mir trócdēm: ven unreĥt geŝīt, ven not herŝt, ven dumhajt valtet, ven hás gezēt vird, ven múkertūm ziĥ brájtmaĥt, ven hilfe fervajgert vird, - ŝtēts ist jēder ájncelne cur ábhilfe mítaŭfgerūfen, niĥt nur di jevajls "cūŝténdige" ŝtele.

*trovita ĉe www.aliaflanke.de*

Ĉu vi estas komencanto kaj volas lerni la gramatikon? Jen la gramatiko en versoj el la interreto-paĝo de
Lucerna Esperanto-Asocio
(eltiro)

Als Artikel gibt's nur **la**, unbestimmt steht keiner da.
Fälle bilden ist nicht schwer. Nehm ich mir den ersten her,
setz ich **de** schnell vor das **la** und schon ist der **zweite** da.
Dann vor **la** gestellt ein **al**, liefert mir den **dritten** Fall.
Doch den **vierten** ich erkenn' an dem angehägten **–n**.
Läuft ein Stamm auf **–o** hinaus, wird sogleich ein **Nomen** draus.
Wird das **–o** durch **–a** ersetzt, **Adjektiv** bedeutet 's jetzt.
Noch ein **–j** dazugetan, zeigt es uns die **Mehrzahl** an.
Jede **Grundzahl** deiner Wahl wird mit **–a** zur **Ordnungszahl**.
Möchte ich was tun/betreiben, darf mit **–i** al **Verb** ich 's schreiben.
Und steht **–e** am Ende gar, stellt sich ein **Adverb** nun dar.
Was **gegenwärtig** wird getan, zeigt am Ende **–as** uns an.
Und ist etwas schon **gewesen**, lässt sich's klar aus **–is** erlesen.
Was in **Zukunft** noch geschieht, man durch **–os** am Ende sieht.
**-us** zeigt die **Bedingung** an, doch mit **–u** **befehle** man.

trovita ĉe http://jfliegner.bei.t-online.de/home.htm

**interesaj interreto-paĝoj**

www.wissen.de

montras interalie sciindajn informojn ankaŭ pri Esperanto.

www.esperanto.de

Ĉefa paĝo de GEA kun multaj eblecoj por plusurfi en E-vivo de la landaj asocioj kaj de la fak-asococioj.

www.aliaflanke.de

estas interesa kaj amuza paĝo de la Konstancaj esperantistoj interalie kun informoj pri diversaj urboj de Arenys de Mar ĝis Zagreb kaj elekto de salutkartoj, sendeblaj per elektronika poŝto.

www.esperanto.nu

kun kartaro pri amase da interret-adresoj en la tuta mondo.

www.esperantoland.de

kun aktualaj informoj pri eventoj kaj aranĝoj en Germanio kun speciala mapo.

http://jfliegner.bei.t-online.de/home.htm

kun ampleksa E-vortaro kaj gramatikaj ludoj.

www.esperanto.pl

kun konekto al la ĉiutaga radioprogramo de radio Polonia.

Kiel kontaktu nin? +493831490003 Gun.Eb@t-online.de